

Pola Esperantisto

Esperantysta Polski

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTANTOJ

XXVII JARO
NR. 11.

Redakcio kaj
Administracio KRAKÓW, LUBICZ 34.
Abonprezoj ktp. vidu ĉe fino de 1^a tekstoparto.

NOVEMBRO
1933.

DR. ANTONI CZUBRYNSKI.

PRI PLUA KONTINUIGO DE LA PLEBISCITO.

La ĝisnuna sperto raportita dum varŝava kongreso en junio 1933 montris, ke la plebiscito povos sukcesi, sed postulas kelkajn reformojn. Antaŭ ĉio oni devas malfermi la konstantan rubrikon en „Pola Esper.“ pri tio, kion oni jam sukcesis fari, pri spertoj kaj rekomendoj. Okazis ekz., ke mi ĝis la aveno al Varŝovo nenion sciis pri tio-ĉi, ĉu ĝenerale ĝi okazos, aŭ ne. Opiniante, ke oni ĝin prokrastis mi nenion komencadis en Mława, ĉar kial ion en iu loko komerci, se oni samtempe nenion faras en la tuta lando? Tial unu loko (Mława) estas jam por plebiscito perdita, ĉar mi estas devigita pro profesiaj kaŭzoj ĝin en aŭgusto forlasi. Estis granda kaj agrabla mia surprizo, kiam mi eksciis, ke ekzistas lokoj, kie oni sukcesis eĉ multe da subskriboj kolekti ekz. en Tarnów, kio por ĉiam estos kun granda gloro por tiea delegitino de U. E. A. kaj organizintino de la loka plebiscito, kiu efektive de tiu-ĉi loko grandskale komenciĝis; el la tuta Polujo estos daŭrigata en aliaj landoj.

Alia manko estas, ke oni la laŭprofesion plebisciton ankoraŭ eĉ ne komencis, kvankam ĝi estas pli facile efektivebla kaj eble eĉ pli grava. Necesas tamen por ĝin efektiviĝi la alvokoj kaj informaj folioj en pola lingvo, kies tekston rekomendan mi jam de longe sendis al krakovaj samideanoj, kiuj tamen ĝin ne presis eble pro manko de mono.

Tial estas rekomendinde malfermi la liston de kotizajoj por plebiscita fondo.

Tio-ĉi estas la plej gravaj sciigoj. Do ni antaŭ ĉio estu informataj, kio okazas en nia lando. Se estas iaj sukcesoj, oni devas pri ili scii, por montri ilin dum plua propagando.

Dum ĉiu kongreso, kunveno, kunveturo de diversaj profesiuloj oni zorgu meti en la tagordon rezolucion favoran al Interŝtata Esperanto-Akordo. Oni ilin kolektu kaj anoncu eĉ en ĉiutagaj ĵurnaloj, se eble, kaj nepre en „Pola Esp.“

Dua demando, kiu venas al la tagordo de nia kuranta politiko esp. estas senpera provo, sendepende de la plebiscito, de varbado de ministe-

riroj de publika instruado por alpaŝo de nia ŝtato (aŭ de aliaj) al Interŝtata Esperanto-Akordo. Povas okazi, ke sendepende de la plebiscito troviĝos iu ministro, kiu volus interkomunikiĝi ekz. kun favora por esp. ministro Beneŝ kaj invitos aliajn ŝtatojn al subskribo de la Akordo. Se ni tiam havos plebisciton (precipe laŭprofesion) finitan aŭ duone finitan, tiam ni per ĝi subtenos nian petskribon al ministerio, kaj la agado estos tiom pli forta. Se la ministerio konsentos tamen entrepreni la ideon pri la Akordo sen la plebiscito tiom pli bone! Sed ne niu diru tiam, ke la plebiscito ne estas necesa, ĉar povas okazi, de dum la ratifo trovos la ideo pri Akordo kontraŭstaron en la gazetaro, aŭ nia parlamento (sejmo). Povas plue okazi, ke en decida momento favoran por nia afero ministron anstataŭos alia por ĝi neŭtrala, kiu pri esp. ĝenerale nenion scios, aŭ eĉ estos por ĝi kontraŭa. Kion ni tiam faros. Per kio ni subtenos niajn dezir-esprimojn? Sed, se ni ĉiam havos malantaŭ ni organizitan publikan opinion, tiam ni povos esti kuraĝaj kaj fortaj en niaj postuloj. Tial nur miopa persono povus ne-vidi la utilecon kaj necescon de la plebiscito. Povas memkompreneble okazi, ke ĝi ne estas necesa en speciale favoraj cirkonstancoj, sed oni ne povas je tio ĉi kalkuli. Ĝi neniam malhelpos kaj ĉiam estos utila. Do, samideanoj, al la laboro!

Favora por ni estas nuna politika periodo. Eble ne en Germanujo, sed en meza Eŭropo, kie formiĝis jam interkonsento kaj Malgranda Entento, kun influhava ministro Beneŝ. Ni ĉi tien eniru kun nia verdluma torĉo!

Se okcidenta Eŭropo montros sin indiferenta por ideo de Interŝtata Esperanto-Akordo tio ĉi ne malhelpos. Ni marŝos dum iu momento sen ĝi. Poste kiam la mezeŭropaj ŝtatoj de Finnlando ĝis Grekujo estos varbitaj por ideo de la Akordo, tiam oni denove povos demandi la okcident-eŭropanojn, ĉu ili obstinas en sia indiferenteco? Eble eĉ sen tiu ĉi demando ili ekkomprenos la situacion kaj propravole alpaŝos al la Akordo.

Dr. LEOPOLD DREHER, L. K.

LINGVA ESPLORO.

Ni rekomencas ĉesigitan pro kelkaj kaŭzoj lingvan fakon sub la nova titolo: Lingva Esploro. Jen artikoleto pri

VOLAPÜK KAJ ESPERANTO.

Estas konate, ke Volapük estis malfacila pro la maltaŭga radikaro, dum la gramatiko ne estis malfacila. Tamen nur malmultaj posedas gramatikon kaj vortaron de tiu lingvo. Jen kial mi opinias utila resumon de ambaŭ por niaj legantoj.

La alfabeto konsistis el la literoj: a, e, i, o, u, ä, ö; ü; b; p; d; t; v; f; h; y, g, k, l, r, m, n, s; j; c; x; z.

La litero ä egalas al angla a en hat (ĉapelo, legu: het), la litero ö al germana ö en schön (bela), la litero ü al franca u en mur (muro, legu kvazaŭ: myr), la litero y en Volapük sonis kiel la esp. j, la Volapüka j sonis kiel nia ŝ, la litero c en Volapük egalas al esperanta ĉ.

Ciuj literoj estas, kiel en Esperanto, nepre elparolendaj, sed la akcento estas metata sur la lasta silabo, ne sur la antaŭlasta.

La deklinacio: men (homo), mena (de homo), mene (al homo), meni (homon), mens (homoj), menas (de homoj), menes (al homoj), menis (homojn).

Vortoj kunmetitaj estis farataj per la genitivo de la vorto malĉefa kuniĝita kun la nominativo de la vorto ĉefa: vol (el angla world mondo), vola de mondo, pük (el angla speak parolo), sekve vol-a-pük mondlingvo.

La esp. sufikso -et sonis en Volapük -il, ekz. volil mondeto, vomil virineto... (vi pensas, cinikulo, pri nia esp. vomigilo).

La finlitero -a estis en Volapük -ik, ekz. gud bono, gudik bona, fat patro, fatik patra, vomik virina, volik monda, pükik parola aŭ lingva ktp. La adjektivo staras kutime post la substantivo, ekz. pük vomik virina parolo.

La infinitivo estis farata kutime el la substantivo, ekz. tik penso, tikön pensi, pükön paroli ktp.

La sufikso -el formis personon, ekz. tikel pensulo, tidel instruisto (tid instruo).

La feminino de personoj kun profesio estis formata per la prefikso of, ekz. of-tidel instruistino, cal (legu: çal) ofico, calel oficisto, of-calel ofici-stino ktp.

Tamen la feminino de aliaj ideoj kaj de inaj bestoj estis formata per la prefikso ji (legu: ŝi), ekz. ji-tidel instruist-edzino, ji-calel oficist-edzino, ji-stäg cervino, ji-gok kokino ktp.

La gradigado okazis per la sufiksoj um kaj ün, ekz. gudikum pli bona, gudikün plej bona.

Interesa estas la prefikso le, mankanta (eble eĉ manksentata) en Esperanto, ekz. masel majster, lemasel mistrz, söl sinjoro, lesöl sultano. Kontraŭe: lumasel majsterek, partacz, lusöl fircyk. En Esperanto ni posedas eĉ du malŝatigajn afiksojn la „aĉ“ kaj la „fi“, sed mankas sufikso aŭ prefikso de estimo, ŝato, plaĉo. En poezio oni provis en Esperanto la prefikson bel-, ekz. belsinjoro, belknabino, laŭ la malnovaj „belvetero“, „belsona“ kaj kelkaj aliaj. La esp. -eg havas tute alian signifon, eĉ pli malŝatigan ol ŝatigan, sekve ĝi ne taŭgas. Vidu „Esprimoj de sentoj en Esperanto“ de E. Privat.

Oni uzas ankaŭ grand-, bon- kaj aliajn en Esperanto, ekz. grandsinjoro, bontrovi, aŭ super- ekz. superhomo, sed ĉiuj ne taŭgas, havante ĉiu alian, kvankam iom similan signifon al la Volapüka le-.

Por vin konsoli, mi montros al vi la malagrablegan verbon en Volapük: aro da prefiksoj montras tempon, sufiksoj esprimas personon, ekz. mi amas löfob, vi amas löfol, li amas löfom ktp.; mi amis älöfob, mi amos olöfob, vi estas aminta elöfol, li estos aminta ulöfom (!).

La pasivon karakterizas la litero p: mi estas amota polöfob, vi estas amita pulöfol, li estis amata pälöfom ktp.

Ĉu vi nun komprenas la sencon de la esprimo: „volapükaĵo“?

En sekvonta artikolo mi skizos la radikaron de V. komparatan kun tiu de Esperanto, laŭ la vidpunktoj de internacieco, belsoneco kaj lernebleco.

RAISSA SCHAFFEROWA.

PATRINECO

(el pola lingvo tradukis Leonja Fruchtówna).

La sunradioj difektis fantaziajn filikojn el prujnokristaleloj kaj enpuŝis sin en grizan internajon. En orbrila spegulo trarigardis sin en malalta per fulgo kovrita plafono. Senkoloriĝintaj tapetoj ŝajnis ankoraŭ pli tuŝitaj de tempdento. La kuirejo ekkuraĝis malheligi per fumanta elspiro la ludon de suna aperaĵo.

Anna fritis terpomajn flanelojn. La haladzo de rostita graso penetris en ĉiujn fendojn ĉirkaŭblovante per sveniga odoro silkajn cindrokolorajn harojn, lipkoralon, kaj rasajn naztruojn de belega nazo.

Subjugigitaj flamoj, incititaj de disversita grasajo liberiĝis kaj eksplodis. En fajra aŭreolo montriĝis fantome la alta fruntarkaĵo de Anna, kiun povis ornamami krono, fingroj longaj kaj maldikaj kvazaŭ kreitaj por multekostaj ringoj, silueto mola kaj alloga, malbeligita per kuireja antaŭtuko.

Jetita sur fonon de griza ĉiutageco, kies devizo estis malkareco kaj ŝparemo, Anna estis devigita vivi vivon sen iluzioj, en monotoneco de hodiaŭo kaj morgaŭo. Elemento de ŝia edzo estis la mondo de nombroj kaj ciferoj. Estante modesta oficisto de Asekura Societo li kalkulis, prikalkuladis, rekalkuladis. Ĉi scio liveradis al li ĉiutagajn impresojn, la ciferoj kreskadis ĝis egaj potencoj kaj spezante paperajn milionojn li havis iluzion, ke ili estas veraj.

Li amis Anna'n sincere. Lia amo ne estis brilaja. Li ne kapablis amajn esprimojn kaj ravojn. Fremda al li estis la efekto de mensogo, tio kio ebriigas kaj duone senkonsciigas virinon, kondukas en iluzimondon por poste puŝi sur erarvojon kaj fortranĉi la vojon returnen. „Estu mia, mi donos al vi sunon kaj senzorgan estonton“ parolis la viroj. Brilanta tento dissternadis antaŭ ŝi sorĉon

de belaj vestaĵoj, luksaj aŭtomobiloj, ordonadis al unuj ŝin adori, al aliaj por ŝi pereji. Ŝi moderigadis malrapide sed efike koron, sangon, sentojn. Tenis Anna'n ĉe edzo nur la oneto de memsaviga instinkto kiel nerimarkebla ĉeno tenas la ŝtalkorpon, ke ĝi en sia kuro ne disfrakasiĝu.

Hodiaŭ pli forte ol iam ajn lacigis ŝin la kuireja odoro. Ĝi penetradis al koro, kiu strange svenetadis. La kruroj fleksiĝadis sub korpopezo, de sur frunto fluadis perlosimila ŝvito. Ŝi ekstaris por reguligi la horloĝon. Sed la objektoj ektorniĝis en freneza tempomezuro, sango milmartele ekfrapis la tempion. Anna sveninte, falis. Ŝi ekvidis kuraciston kliniĝintan super sia kapo. Indiferente li eldiris vortojn, kiuj traigis la ĉambran atmosferon rebatiĝante ektuŝis la muron por ekloĝi en la cerbo de Anna.

„Vi devas zorgi pri si, vi iĝos patrino“.

Patrineco ie alie profanita, malpurigita enpaŝadis en ŝian hejmon por eklumi en tuta sia gloro. La muroj de malgranda ĉambro malfermiĝadis por ĝia buĉveno. La aĵoj perdadis sian amplekson por doni lokon al plej deziregata meblo-infanlulilo. Melodioj, kiuj iam ajn atingis oreton de Anna ĉeniĝis je mallaŭta ebria lulkanto.

Ŝi karesadis blondajn haretojn, dormigadis safirkolorajn okuletojn kaj sur sia cigna kolo ŝi sentis ĉirkaŭprenon de molaj infanaj manetoj. Sur tiu ĉi kolo, sur kiu ŝi ĝis nun deziris havi nur perlojn. Ŝi kuŝis senforte kaj la fantazio per kolora paletro pentris ĉiam pli allogajn bildojn el infanaĝo de naskiĝonta estaĵo. Ĝi forkaŝadis ĉion, kio povis vundi la feliĉigitan Anna'n. Posttagmeze edzo de Anna revenis el oficejo. La blankiĝintaj lipoj elflustris la ĝojan novajon. La muskoloj de lia vizaĝo ektremis esprimante neatenditan feliĉon. La ruĝiĝintaj okuloj malsekiĝis. La emocio silentigis vortojn povantajn esprimi tion, kio okazis en lia animo. Ligna eta homo kunfrapis la manojn kaj komencis danci tra la ĉambro, kiel infaneto. Poste li genufleksis, ĉirkaŭprenis la kapon de Anna kaj premis al sia koro.

Jam delonge krepuskiĝis kaj la geedzoj ne ekbruligadis la lampon timante dispeli siajn revojn pri feliĉo. Li ne ekrimarkis, ke el stelaj pupiloj de Anna elverŝiĝis larmoj kaj malseketigis liajn harojn. Ili estis la unuaj larmoj de repaciĝo kun griza vivo ĉirkaŭradiota de leviĝanta suno — ilia infano.

PRI NIA LINGVUZADO.

Pri tiu temo oni skribis ne unufoje. Mankas tamen verko ampleksa, kie oni povus lerni ĉion kio koncernas ĝustan, seneraran uzadon de nia lingvo. Kiom da eraroj tial estas farataj, ne nur de komencantoj, sed eĉ de esperantistoj kelkjaraj, ofte multjaraj, delegitoj de UEA, kursgvidantoj aŭ eĉ aŭtoroj de libroj, aŭ similaj!

Kial mi skribas pri tio ĝuste nun?

Okazis en Kraków malgranda „universala kongreso“: la I-a Esperanta Semajno, en kiu partoprenis amaso da Krakovaj kaj ĉirkaŭkrakovaj esperantistoj. Kiom da ili perfekte majstras nian lingvon? Estas preskaŭ timige, kiel multe oni — balbutas la lingvon, kaj ankoraŭ pli terure, kiom da eraroj oni faradas en la uzado de Esperanto!

Hector Hodler, unu el niaj plej eminentaj kaj seriozaj pioniroj, skribis en siaj lastaj vivjaroj, artikolon tit. „Ellernu“! Li sentis kaj spertis tiun malbonegan, por bona esperantisto malagrablegan staton, ke la amaso esperantista, konsistas en sia tuto el neplenlernintoj...!

Ĉu vere estas tiel malfacile veni al ia pli malpli alta stato de kono pri Esperanto por la meza esperantisto? Ĉu nia lingvo nepre havu la saman sorton, kian kun si trenas la aliaj fremdlingvoj, la franca kaj angla, multe kaj vaste studataj en Eŭropo kaj tamen neniam finstudataj de la komencintoj?

Mankas vere verko ampleksa, kiu donus ĉion pri la lingvo, kio helpus al tiuj aroj da esperantistoj ne plu fari erarojn; indikon al finlerno, al perfekteco. Dum la Semajno, el ĉiuj esperantistoj ekestintaj lastjare, t. e. de post la lastaj 2—3 jaroj, nur unu mi ekkonis flue, senerare povantan interparoli... Ĉu ne pli multaj ellernis en la daŭro de la lastaj jaroj? Kion helpas, ke aperis 100 novaj esperantistoj, se inter ili ne pli ol unu estas nomebla kiel instruisto? Ĉar al la aliaj mi neniam povus kun pura konscienco konfidi klason de esperanto-lernantoj.

Eble helpas ekzamenoj, kiuj jam delonge ne okazas en Kraków, ĉar tiam la aro iom preparas sin por montri sin antaŭ la esplorantoj. Oni devas ekpensi pri plioftigo de ekzamenoj.

Bone estus ankaŭ promesi premiojn al plejbonuloj. Ni devos komenci ion similan per la malgrandaj rimedoj disponeblaj: 10 ĝis 20 zlotojn ni povus promesi (kaj efektive doni) al tiu inter ekzamenatoj, kiu plej sukcesis. Al la malpli sukcesa lernanto konsolpremion de 5 zlotoj, kaj al la aliaj — verkon en Esperanto, por ke ili allernu...

Ce tiu ĉi okazo jen grava informo kaj samtempe: propono.

Dum la Esperanta Semajno en Kraków ni faris en ĉiuj Krakovaj mezlernejoj (gimnazioj kaj liceoj) pri esp. prelegojn, kiujn sekvas nun kursoj. Mi proponas kaj eble ni efektivigos tion, ke ni diskonigas jam nun, en la momento de komenciĝo de la kursoj, ke por ĉiuj mezlernejanoj, eklernintaj en la nuna lerneja jaro Esperanton, ĉu private, ĉu en la kursoj lernejoj mem, la esperantaj grupoj Krakovaj destinas 3 monpremiojn, ekz. la unua premio 25 zl., la dua 10 zl. la tria 5 zl. Tio certe helpas, ne nur instigi la ankoraŭ hezitantajn, lerni, sed ankaŭ — kion mi ja opinias ankoraŭ multe pli grava — ellerni la lingvon. La komuniko aperos en la Krakovaj gazetoj, okaze de ĝenerala raporto gazetara pri la rezultoj de la I. Semajno, kaj per interlerneja rondkomuniko t. e. komuniko rondire transdonata per la lernejoj estraroj.

En la venonta numero de nia gazeto ni povos raporti pri tio, mi esperas.

Dr. Leopold Dreher, LK.

P. S.

Kial mi skribas pri tio en P. E. anstataŭ atendi ĝis estos plenumita mia propono? Ĉar samtempe okazas ankaŭ en aliaj urboj esperantaj semajnoj: la aranĝantoj bonvolu memori pri la bezono instigi la lernontojn per premioj similaj al tiuj, kiujn ni intencas.

La sama.

LIBERTEMPAJ REMEMOROJ EL KRYNICA, REĜINO DE POLAJ KURACLOKOJ.

Mi ekuzis tiu-ĉi-jare la okazon viziti en aŭgusto nian plej faman banlokon, Krynica despli, ke ĝi allogis min per perspektivo de okazonta festivalo laŭ modelo de similaj eksterladaj aranĝoj en Salzburg kaj Vichy.

Situata ĉe Karpatoj, 600 m super la mara nivelo, en la valo de la rivereto Kryniczanka, ŝirmita antaŭ la norda vento de la montaro, prezentas Krynica unuarangan banlokon, dank' al siaj mineraloj fontoj, komforte aranĝitaj banejoj kun marĉ — kaj gasbanoj.

Ĉirkaŭata de arbaroj kaj kampoj somere ĝi naĝas en verdaĵo kaj floraro, kaj vintre ĝi vestas sin en blankan neĝmantelon kaj dank' al nekutime favoraj cirkonstancoj terenaj kaj klimataj ĝi fariĝis unu el pli gravaj centroj de vintraj sportoj. La ĉiujare aranĝataj internaciaj sportkonkursoj arigas milojn da sportuloj.

Dum somersezone luksaj sunbanejoj, komfortaj promenejoj en arbaroj eĉ la plej malsanulojn allogas per luksaj benketoj, ne dirante jam pri junaj kuracatoj, kiuj krom la sano volas trovi ĉi tie ankaŭ ion por animo kaj koro.

Inter verdaj herbovojoj, ĉirkaŭantaj la bandomon, la trinkejon de mineralaj akvoj kaj malnovajn banejojn speciala atento turnas sin al promenejo, kiu aspektas kiel unu granda tapiŝo pro sia riĉeco de belegaj floroj, precipe dalioj diverskoloraj. Novaj parkoj kaj skveroj faras el Krynica unu grandan florgardenon.

La 15 an de aŭgusto okazis solena ceremonio. La tarnova episkopo Lisowski aspergis la novan stacidomon en ĉeesto de multaj krakovaj eminentuloj, inter aliaj de nia estimata prof. Bujwid.

Fine la 20-an de aŭgusto komenciĝis la unua siaspece art-kultura aranĝo t. n. Festivalo, kiu allogis multegajn gastojn el la tuta Pollando al reĝino de polaj mineralaj fontoj.

Cio plej bona, per kio nia lando disponas sur kampo de l' arto, muziko, sporto, danco kaj teatro koncentriĝis en la tempo de 20a de aŭgusto ĝis la 10a de septembro kaj la Festival-Komitato donis tian riĉecon de aranĝoj, ke fariĝis vere impona allogaĵo por ĉiu alveninto.

Sur bela stadiono, sub ĉiela tegmento multaj, okazintaj koncertoj fermis veran feston de l' arto kaj kulturo. Interalie ege plaĉis al ĉiuj muzikamantoj belegaj, simfoniaj koncertoj kun partopreno de tiel famaj virtuloj de l' pola muziko kiel Szymanowski, Werwińska, Fedyczkowska, Totenberg kaj orkestestro Fietberg.

Vespere ĉiutage okazis en la Salonego de la Bandomo pluaj koncertoj de kantistoj, danc-kaj literaturvesperoj de famaj dancistinoj, verkistoj kaj aktoroj, ne parolante jam pri ĉiuspecaj dancokazoj en diversaj dancejoj kaj kafejoj.

La sportuloj povis admiri la plej famajn stelojn de l' pola sporto kiel Kusociński kaj amatoroj de la teatraĵoj ĉeestis la prezentadojn de la plej bonaj polaj artistoj en la tiea teatro.

Bedaŭrinde la vetero ne estis tre favora kaj la entuziasmoj dum belaj koncertoj sub ĉiela firmamento sufiĉe ofte havis okazon profiti de l' senpaga duŝo.

Krom tio la ĉarmo de l' multaj ne ĉiutagaj aranĝoj estis vere neforgesebla, kaj kun malgaja koro mi forlasis la belegajn parkojn, arbarojn kaj dancejojn de Krynica, la perlo de polaj banlokoj dezirante al ĝi pli kaj pli grandan disvolviĝon kaj progreson.

N. Bertizanka.

TEATRO KAJ FILMO

De kelkaj monatoj ni batalas sur tiu-ĉi modesta loko pri esperantlingva tonfilmo kaj ni informas pri filmo pola. Nun ni plivastigas nian rubrikon: de tempo al tempo ni aperigos tie informojn pri pola teatro kaj polaj teatraĵoj.

Koncerne al prezentado en Krakova Urba Teatro de „Eros kaj Psyche” ni presigas la ĉi suban artikolon.

Red.

RYSZARD LINKOWSKI.

„EROS KAJ PSYCHE”.

„Eros kaj Psyche” de Żulawski estas jam konata al pli aĝa generacio. Laste prezentis ĝin ĵus mortinta J. Sosnowski kune kun Irena Solska en rolo de Psyche. Kiel simptoma kuniro de cirkonstancoj (kiel ankaŭ simbola estas la teatraĵo mem) — en momento, kiam mortas tiu lasta prezentanto de Eroso — lia posteulo, gvidanto de evolua modernismo en pola teatro, Osterwa, donas al ni denove Eroson, la saman, kaj tamen alian.

Se temas pri enhavo de „Eros kaj Psyche” — ĝi estas en plej granda parto simbola: la batalo de animo kontraŭ korpo (kiel substrekas la aŭtoro), de bono kontraŭ malbono — sufragistinoj eĉ povus tie trovi la batalon de virino kontraŭ viro.

Tiu ĉi batalo disvolviĝas ek de la tempoj de antikva Grekujo, ĝis la tago morgaŭa, tago de „Liberiĝo” de la animo, pro kio eniĝas en ĝin Eros.

Psyche kaj Blaks, la animo kaj la korpo, mortas kiel korpoj kaj reviviĝas kiel simboloj; preskaŭ la samaj homoj, kiuj nur evoluas dum jarcentoj. Oni eĉ povas riski tezon, cetere tre verŝajnan, ke tio, kio ni estas, kaj kiuj ni estas, estas nur plua paŝo sur tiu ŝtuparo de konstanta evoluo; tiel, kvazaŭ ni travivis jam la antaŭajn ŝtupojn iam en alia estanteco.

La spektaklo, kiam prezentis al ni Osterwa, dank' al ludo lia kaj de Hanka Ordonówna faris neforgeseblan impreson.

Menciinda estas la solvo de VII akto: de Estonteco. La solvo per mekanikigo de homaj movoj kaj voĉoj kaj kovro de vizaĝoj per gasmaskoj.

Esperantigis Ed. Lin.

„LUDILO”.

Jen titolo de nova pola filmo, kiun reĝisoras M. Waszyński.

La enhavo de la filmo prezentas la vivon de „girlsoj”. En ĉefaj roloj ni vidos geartistojn Alma Karr, Zula Pogorzelska, Halina Zawadzka, Eugenjusz Bodo, Jerzy Mar, Sielański, Biegański.

DR. LEOPOLD DREHER.

EL MIA ESPERANTISTA MEMORLIBRO.

Kraków, la 22-an de okt. 1933.

Estas la 10. matene, mi ĵus vekigis de peza dormo postmaldorma, ĉar nur je la 6. matene mi enlitiĝis hodiaŭ, post tutnokta Verda Nokto de la I. Esperanta Semajno.

Finiĝas la Semajno de Krakovaj esperantistoj. Hodiaŭ, dimatĉe, estas la lasta tago; posttagmeze prof. Bujwid, nia senlaca propagandisto, diros ankoraŭ unu propagandan paroladon en la Domo de Pola Soldato, samtie okazos publika lotumado de la Semajno.

La tutan semajnon — tio okazos al mi la unuan fojon depost tre longa tempo, depost la Krakova Universala Kongreso 1931 — mi ne povis kontinui la skribadon de mia memorlibro. Mi skribadas ĉiam vespere, sed en la lastaj tagoj ĉiuj miaj tagoj estis ĉe la Semajno: lunde ni festis la solenaĵojn de malfermo, marde estis la „revuo“, merkrede publika provleciono de Esperanto, jaude la „Hungara Vespero“, vendrede, vendrede, nu jes, okazis mia hungarvina vespero, vi komprenas... Kaj sabate, fine, tio estas hieraŭ, la tutnokta dancadada..

Mi estas ja ankoraŭ laca, ĝustadire, mi ne povis pli dormi ol du horojn hodiaŭ, mi tamen skribas, por ke ne forkuru de mi la rememoroj de la lastaj „gravegaj“ tagoj.

La solena Akademio en la kinejo de Muzeo Industria. Grandaj afiŝoj en la urbaj stratoj kun 4 de malproksime videblaj verdaj steloj ĉirkaŭ la afiŝo, en kies mezo-supro la literegoj:

I. ESPERANTA SEMAJNO.

Kraków ekrememoris pri la universalaj kongresoj 1912 kaj 1931. En ĉiuj iom gravaj kafejoj kaj restoracioj sur la tabloj kuŝas nia senpaga broŝuro pri la Semajno, kun detala programo por ĉiu tago kaj eĉ ampleksaj artikoloj pri Esperanto. Antaŭ ĉio frapas la informo entenata en la broŝuro, verkita de prof. Bujwid mem, pri lia interparolo kun la Prezidanto de Pola Respubliko Ignacy

kiuj kreskadis de jar' al jaro en preskaŭ fulmrapida maniero. Karakterize tamen estas, ke la Danzigaj senatoj ne plenumis multajn el la akceptitaj de la Libera Urbo rekomendojn de la Ligo de Nacioj. Neĝusta financpolitiko de Danzigaj senatoj, kreanta ĉiam pli novajn malfacilaĵojn al la Libera Urbo, estis laŭmerile kritikata kaj konvene kondamnita de la Danzigaj ekonomiaj sferoj. En rezolucio, akceptita dum kunsido de Danziga Komercia Ĉambro la 18. XII. 1930 koncerne la financsanigan programon de la senato ni legas interalie: „La nuna financa krizo postulas sanigan programon en la plej vasta signifo de tiu vorto. Oni ne povos ekzisti sen oficigo de ŝparkomisaro, sperta pri administrado, sed staranta ekster la Danziga administrantaro kaj provizita per larĝaj plenrajtigoj. Neprega kondiĉo de la financsanigo estas limigo de salajraj elspezoj kaj redukto de elspezoj de la Libera Urbo. Decidan signifon posedas la fakto, ke pliigis plej diversaj impostaj devoj kaj aliaj publikaj depagoj, ŝarĝantaj laborejojn kaj malfortigitajn ilian konkurforton rilate al najbaraj ŝtatoj kaj aliaj Baltaj havenoj“.

Ni vidas, ke prudentaj individuoj kaj sobraj Danzigaj sferoj komprenas, en kiel neĝusta direkto iras la Danziga politiko, fermanta pro politikaj kaŭzoj ĉian vojon por profita ekonomia kunlaboro kun Polujo kaj tute ne zorganta pri la florigo de la haveno en Gdynia. Nun la Danziga gazetaro plendas pro la reganta en Danzig senlaboreco. Unu el gravaj kaŭzoj de la senlaboreco estas ĝuste la malemo de la Danziga senato al pli forta ekonomia kunigo kun Polujo en formo de unuecigo de ĝia ekonomia legaro kun koncerna legaro de Polujo, pro kio estas grave malfaciligita la ekspansio de aro da Danzigaj industriaj branĉoj al la pola merkato. Plivigligo de la Danziga industrio eminente malaltigis la senlaborecon.

Malgraŭ tiu politiko kontraŭa al elementaj ekonomiaj principoj, Libera Urbo Danzig disvolvigas per forto de inerteo ne nur koncerne la kreskon de komerca trafiko en la haveno, sed ankaŭ alirilate. Indas

Mościcki. La Plejalta Instanco en Polujo konsideras Esperanton necesa aldono al la instruado de polaj aviadistoj, ĉar ja tiuj pasas en kelkaj horetoj tra multaj landlimoj, sekve bezonegas lingvon internacian.

La solena Akademio, mi revenas al ĝi. Jam de 10 minutoj mi ĝuas la konversacieton kun nia Tarnova kunbatalantino, fr. Traum, sidanta malantaŭ mi. Ankoraŭ ne envenis la urbaj kaj ŝtataj „gravuloj“. Oni atendas ilin. Jen ili venas: la vicvojevodo, la vicprezidanto Dro Klimecki, I. reprezentanto de la garnizonkomandanto gen. Mond s-o k. a. Ankaŭ grava estas la apero de la fama felietonisto de Kurjer s-o Z. Nowakowski, kiu eksidas „modeste“ en la dua vico, en la sama, en kiu mi tenas min „malmodeste“...!

Prof. Bujwid aperas antaŭ la multega kunvenintaro kaj ekparolas. Li mencias Leibnitzon, la antaŭdirinton de lingvo internacia, Zamenhofon, ties realiginton. Li ekprenas la nove-kudritan belegan, esp. standardon kaj enmanigas ĝin al la vicprez. Zajaczkowski. Ĝi estas grandioza! Ni, esperantistoj ankoraŭ ne vidis ion similan en nia juna movado 50 jara! Tute — blanka, kun granda verda stelo en la mezo, kun admirindaj orfadenaj franĝoj, ĝi brilas silke kiel sanktaĵo. Metalstelo ornamas ĝian supron en „ovalo de rondo“ sammetala. La maljuna batalanto estas kortuŝita. Kun emocio, en sia pura voĉo li transdonas ĝin, artverkon de s-anino Srebrna kaj s-ino Pompei al s-ano Zajaczkowski, kiu estas eĉ pli emociita ol la profesoro mem, ĉar kun signifo plena silente ĝi li transprenas ĝin...

Sekvas enigado de honoraj najloj, kiujn batas persone la alvokitaj donacantoj. Mi mem rezignis persone enbati la akran objekton, ĉar — mi ne estis inter la alvokitoj... Tio ja ne gravas: „plej gravas humoro“... Damage estas nur, ke mi speciale estis dum tri tagoj sinsekvaj lerninta personan enigadon, do por kio mi tiom „studis“?

La lektoro de Eperanto Hodakowski suprenpaŝas la estradon kaj legas antaŭ la eminentaj gastoj (mi ne estas gasto en Esperantujo!) diversajn faktojn el la esperantista movado, mez' el lastjaraj numeroj de Heroldo. La aŭskultantoj estas impresigitaj. Ankaŭ min mem tiaj aferoj agrablege lulas en mia esperantista memkonscio.

ĉi tie indiki la kreskon de ŝparaĵoj en Danzigaj ŝparkasoj, kiuj de 40 milionoj da Danzigaj ĝuldenoj en j. 1925 kreskis ĝis 95.4 milionoj en j. 1930. Deponaĵoj en privataj bankoj montras en la sama tempo kreskon de 75.5 ĝis 162 milionoj.

Danzig en apogo je ekonomia organismo de Polujo posedas bonegajn kondiĉojn por sia potenca ekonomia florigo. Tiujn ekzistantajn grandegajn eblojn oni devus nur elprofiti. Tio povas nur tiam fariĝi, kiam almiĝraj elementoj amase venintaj Danzigon el Germanujo ĉesos sur la teritorio de Danzig ludi tiel estran rolon, kiel tio farigas nuntempe. Se la Danzigaj komercistaj kaj urbanaj sferoj rekomencus tradicion de malnovaj patricioj Dancigaj, kaj forturnus sin de sufloroj de Berlinaj senditoj, kiuj venis Danzigon, por kirli kaj semi malpacon, tiam sendube sekvus nova erao de granda prospero de Danzig. Tia aferstato estas dezirinda ne nur por profito de Pol-Danzigaj rilatoj, sed ankaŭ por bono de pacigo de tuta Eŭropo.

Tiucele Danziganoj devas forjeti la diktatan al ili de germanaj ŝovinistoj signaldiron: „Zurück zum Reich“, kaj propagandi la sanktigitan de malnova tradicio signaldiron „Libera Urbo Danzig por liberaj Danziganoj“.

Ni rememorigas la nunjaran Esp. radio-programon en polaj radiostacioj.

Bv. la programon vaste diskonigi kaj sendigi multajn danskribojn al la direkcio.

22 novembro. Dr. J. Dobrzycki: Kion signifas trumpetsignalo el la turo de Skt.-Maria preĝejo en Kraków.

13 decembro. Prof. Dr. J. Reiss: Fryderyk Chopin. 27 decembro. Z. Sobotta: Memhelpo de blinduloj en Polujo.

Ciuj prelegoj (krom la lasta) estos diseŭdigataj pere de stacioj en Kraków kaj Warszawa. La lasta estos parolata per Lwów kaj Warszawa.

Komenco de la prelegoj: 22 h. 10 m. Post 15-minuta prelego sekvas la „radioketo“.

Sed jam s-o Sowiński ekkantas, akomp. de s-ino Sopińska (ia vortludo — fortepiana!), aperas tuj post li fr. Rubinstein. — —

„Multaj estis cimbaloj,
Sed ne kuraĝis ludi ĉe Jankjel ludistoj.
(Jankiel, dum tuta vintro, for-estadis ie,
Nun li, kun ĉefa stabo, aperis ĉi-tie).
Sciante, ke neniu sur ĉi instrumento...”

Apud la belege aspektanta fraŭlino sidas fortepian-ludanta s-ino Glücksman, esperantistino, en koncertaj momentoj alludante kvazaŭ ludus Jankjel kara...

La sukceso de tiuj pli ol 200 senerare recitataj versoj de nia majstro Grabowski estas certega. Kun vera admiro ĉiuj alrigardas kaj alaŭskultas, mi mem estas, kiel vi bone scias, molkora kaj ne sciis kion pli frue uzi, la orelojn aŭ la okulojn? Kaj, kiel estis antaŭvideble, la „gravuloj” estas venkitaj: s-o Nowakowski ekstaras kaj sincere gratulas mandone la ĉarmulinon.

Sed kial li tuj foriras, kaj kun li la aliaj „gravuloj”? Verŝajne ili rapidas al la 5 aliaj samtempe okazantaj en la urbo akademioj? Kaj tamen, la societo por protekto de muŝoj promesis al la estraro de „Societo Esperanto”, ke ĝi prokrastis sian festvesperon ĝis morgaŭ!

Ho, kiom ili devos bedaŭri, legante iam mian memorlibron, kaj sciigante kio okazis poste! Aperas sur la estrado la fama kvankam juna ankoraŭ, prof. Schleichkorn, kaj prezentas al ni sian altan „klason” de violonisto. Estas fremdaj kaj ankaŭ propraj komponaĵoj de Schleichkorn, kiu „ne rigardas la forestantajn” gravulojn. Li ludas por mi kaj la aliaj esperantistaj amikoj, li ludas por siaj karaj gepatroj, la estimindaj gesinjoroj Schleichkorn, niaj malnovaj samideanoj.

Ne finiĝis ankoraŭ la vespero. S-ino Tryczyńska, operkantistino ĉarmas nin per sia kristalklara voĉo, Menciindas ankaŭ la akompanantinoj s-inoj Orlińska kaj Łakocińska.

La „Esperon” post tiel altvaloraj artistoj ne kuraĝis kanti la esperantistoj, jen kial tiu punkto de l' programo ne impresis...

La morgaŭan tagon, marde matene mi vizitis la Semajnan ekspozicion, aranĝitan de s-ano Kutscher en la II. etaĝo de Muzeo Industria. Bonguste elmetitaj kelkdek libroj kaj gazetoj, foirprospektoj kaj sim. inklinigis min kredi, ke la akurata administranto de P. E. meritas kareson.. (Kun P. E. oni devas esti ĝentila, alie ĝi ne volos presigi miajn artikolojn, precipe kun la administranto!) Mi volis tuj fari la kareson en la ekspozicia ĉambreto, kaj ĉar tie troviĝis la bela „statistino” de la Semajno, fr. Kiffel, do mi transdonis ĝin pere de ŝi. Post 20 jaroj, kiam tiu ĉi memorlibro estos publikita, ni sciigos, ĉu mia bona intenco estis ĝustatempe plenumita... Eventuale estas pli bone tiam, post 20 jaroj, ol meniam...

Kiam la sama fraŭlino aperis vespere samtage en la „revuo”, kiel „statistino el Hollywood”, mi kun melankolio aŭdigis subite al mia apudsidantino profundan ĝemspiron. Kaj nur nun, post kelkaj tagoj, mi komprenas, kial poste iom post iom malarestiĝis niaj ĝis tiam interarestitaj brakoj: la apudsidanta fraŭlino komprenis, ke ŝi estas neesperantistino...

„Granda stelo” de Hollywood malaperis, sed venis anstataŭe diversaj aliaj steloj kaj steletoj: s-o Plesner, fr. Roth (estas malbele, traŭlino, trompi sian edzon), s-o Lichtenstein (unu el la ĉefaj laborantoj de la Semajno), s-o Ortsman, fr. Szczepańska, nia fama poetino pol-esperanta, kun sia juneta kunulino Romusia Mamber, interparolantaj pri la signifo de Esperanto kaj multaj aliaj. Kaj laj infaninoj de la danclernejjo de fr. Wachsmann! Tiuj 100%-aj virinetoj de l' verda lando, kun la beletaj esp. kostumoj kaj la surĉapaj literoj de la vorto ESPERANTO. Ĉu mi priskribu tion? Mi timas, ke mia vorttrezoro, kiun mi de longe ne plu riĉigas per novaĵoj el la Parnaso, estante principa kontraŭulo de novaĵoj — ne sufiĉos por tio!

Mi prefere eternigu en la mem-orlibro la nomojn de la fidela edzino Kantorowicz, de s-oj Linkowsky, Zajaczkowski, Anhalt, Marczykiewicz, ĉar jam nun mi multajn forgesis.

Merkrede nova allogaĵo: dir. Tor antaŭparolas la provlecionon: pli ol ĉiaj interŝtataj konferencoj pri senarmigo efikas la esperantaj kongresoj por eternigi pacon en la mondo, dank' al la „nova sento”, laŭ la opinio de tiu energia kaj

praktika progresulo, al kiu la esperantista mondo dankas la okazigon de la XXI universala kongreso. Poste la lektoro Hodakowski „sin prezentas“: mi estas lektoro, kio estas vi? Mi estas domposedantino (ne: trompesidantino!), kio estas vi? Mi estas advokato (ne: katovato!) k. t. p. Bedaŭrinde estas nur, ke la domposedantino ne aliĝis al la kurso, ĉar for ŝi kunportis sian monujon, dirante, ke ŝi ankoraŭ ne pagis al la financ-oficejo la lastmonatan partopagon por la akvokonduka imposto. (Ŝi petis, ke la financoficejo prokrastu la enkasigon, sed ŝi ne sukcesis, ŝi ricevis rifuzan respondon. Sed estas pli bone tiel, ĉar ŝi almenaŭ pagos al mi mian ŝuldon pro la hieraŭa juĝeja diskuto kontraŭ Nepagoviĉ).

Ankaŭ jaŭde mi ĉeestis la „Hungaran Vesperon“, kie prof. Bujwid kaj prof. Biliński klarigis festmaniere la signifon de la 400-jara datreveno de naskiĝo de Stefano Batcry, unu el plej gravaj polaj reĝoj. Fr. Berkvic kaj s-o Sowiński regal'is nin per siaj perfektaj muziko kaj kanto. Ni denove vidis fr. Szczepańska kun Romusia. La lerta infanino ŝajnas havi talenton — saltjetante sin ĉirkaŭbraki sian „panjon“ pro tio, ke ŝi promesas al ŝi preni ŝin kun si al Budapeŝto. Ho, kiel mi enviis Romusian, pro la bela ŝanco vidi Budapeŝton ankaŭ! Kaj nova „stelo“ de l' danco — fr. Satan, alfiksis al si ĉies okulojn, per siaj korpsvingoj kaj la kuraĝa okul-suprenigo.

Mi estas jam laca skribi plu pri la Semajno. Ne malpli ol vi — legi miajn priskribojn. Sed venas nun la vico al la

Verda Nokto

kaj tial, ke mi ne dormis dum la tuta nokto, mi rajtas esperi, ke eĉ vi, mia nekonata leganto, vekigis ĉi momente, por kune kun mi admiri la belegajn tualetojn de la fraŭlinoj, kaj de la Societaj sinjorinoj Neuberg, Srebrna, Szczepańska (la patrino de fr. Szczepańska), de la Societa fervorulino fr. Bertig kaj aliaj, helpantaj amuzi kaj nutri la gajan piedlaborantan junularon. Prof. Bujwid honoras la Nokton ĝis iom post la 12-a horo, fr. Weinsberg preferas danci, sed s-o Wiesenberg traras ŝin kun si hejmen, mem trenite de sia edzino. Mi estas, feliĉe, netrenebla, tial mi restas „ĝis iom post“ la 6-a horo blankmatena... Mi portas hejmen la restajojn de mia korego vaste noktinta tra la verda ĉambraro.

Ĝis la revido, kara Semajno, revenu akurate!

La 22-an de okt. unu horon poste.

En mian manon venis nur nun la hodiaŭa numero de „Il. Kurjer Codz.“ Kaj kion skribas ĉi dimanĉe Nowakowski? Ĉu ne pri... la Semajno... Kia sentimo de espero? Kaj tamen! Kaj tamen ĝi estas, la felietono pri la Semajno. S. t. „Multaj estis cimbaloj“ Nowakowski verkis efektive speciale al ni dediĉitan felietonon Pri fr. Rubinstein kaj ŝia belega deklamo, pro kiu, li konfesas, li volis ŝin — mortigi... Kaj pro la Grabowski'a „fajfante“... Sinjoro Nowakowski! Bonvolu pli ofte memori pri ni! Vi faris al ni „sakramentan“ reklamon! Ni bone memoros vin! Kiel Karolon Irzykowski dum la VIII kongreso...

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

AŬSTRUJO. Nova propagandrimedo. Vienaj esperantistoj interkonsentis kun multaj vienaj firmaoj, kiuj deklaris sin pretaj fiksi sur montrofenestro belan verdan stelon kun surskribo „Esperanto“, kio signifas, ke la firmao estas liveranto de la esperantistoj. Montrante en tiuj firmaoj esperantan mebro-karon, oni ricevas rabaton.

ĈEĤOSLOVAKUJO. Imitinda ekzemplo. La ĉeĥoslovaka fervoja ministerio estas tre favora al Esperanto. Laste ĝi donis permeson lokigi en ĉiuj stacidomoj de la respubliko ladajn tabulojn kun verda stelo, la vorto „Esperanto“ kaj mallonga surskribo kun adreso de loka Delegito, Esperanto-Grupoj, k. t. p. En la plej proksima tempo en 1000 ĉeĥoslovakaj stacidomoj troviĝos tiaj tabuloj.

Efikoj de Gazetara Servo de Ĉ. A. E. Gazetara Servo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista atingis, ke dum jaro 1932, 227 ĉeĥaj gazetoj enhavis 1089 artikolojn pri Esperanto.

CINUJO. Printempo en aŭtuno en ĉina traduko. Fama romano de Baghy „Printempo en aŭtuno“ aperis antaŭ nelonge en ĉina traduko de S-ano Bakin, verkisto en Sanghajo.

FRANCUJO. Esperanto en franca Radio. La ministerio por poŝto kaj telegrafo metis je dispono de Societo por Propagando de Esperanto la nacian radiostacion

„Tour Eiffel“ por Esperanto — dissendoj pri turismo. Tiuj dissendoj okazas ĉi-sabate de 15'15 ĝis 15'30. Ĉiujn paroladojn malfermas aŭdigo de la „Espero“.

GERMANUJO. „Gleichaltung“ de la Esperanto — Movado. Kiel montriĝas t. n. „Gleichaltung“ de la Esperanto Movado en Germanujo estas difinita jam antaŭ la Kolonja Kongreso! Tamen „Heroldo“ eĉ per unu vorto ne menciis pri tio. 11-a artikolo de la „Richtsätze für Gleichaltung der Esperanto Bewegung in Deutschland“ tekstas: „Nearjanoj, marksistoj kaj komunistoj estas ne al-lasataj“. Ano de la D. E. B. povas esti nur naci-socialisto. Kia feliĉo, ke Zamenhof jam ne vivas kaj speciale ke li ne vivas en Germanujo. Li ja ne povus partopreni en Germanujo la Esperanto-Movadon!

HISPANUJO. Novaj Zamenhof-Stratoj. En kelkaj urboj oni inaŭguris Zamenhof-Stratojn.

Grandaj sukcesoj de Poloj en „Internacioj Floraj Ludoj“. En la ĉiujara literatura festo: „Internaciaj floraj ludoj“ la unuan premion pro la poemo pri-kanta amon ricevis pola samideano s-ro Robert Świątoszewski el Wyszgrod. Krom tio pro ama verko en prozo gajnis la unuan premion s-ano Jakobo Szapiro el Białystok, kaj pro la temo „Esperanto, grava ilo ĉe la universaligo de la juro — s-ano Henriko Gelb el Varsovio. — Kiel do ni vidas, polaj samideanoj gajnis 3 unuajn premiojn.

HUNGARUJO. Esperanto dum la jamboreo. Dum jamboreo estis entute 200 esperantistaj skoltroj el 24 landoj, do tio estas nur 1%. Sed el kelkaj landoj venis eĉ pli ol 10%; la procento atinginda dum la venontaj jamboreoj (speciale dum la Tutslava jamboreo en Kraków dum 1934). Kelkfoje enestis esperanto-artikoloj en tendaro-gazeto, kelkfoje oni parolis esperante pere de Radio. — Kiel ni vidas, la rezultoj tre modestaj, sed sufiĉaj por instigi al streĉa laboro inter la skoltaro.

Vojaĝoficejo „Verda Stelo“. Ĝi estas vojaĝoficejo de laboristaj esperantistoj kun la celo: aranĝi kolektivajn ekskursojn kaj amasvojaĝojn inter la esperantistaj grupoj de diversaj landoj, respektive grandskalan ferio-interŝanĝon inter la esperantistoj, por ke ili ankaŭ povu pasigi kelkajn semajnojn en eksteraj landoj. — La ideo estas bonega kaj imitinda. Esperinde ankaŭ en aliaj ŝtatoj ekestos tiaj oficejoj (sed memkompreneble universalaj kaj ne nur laboristaj).

LATVUJO. Esperanto-paĝoj en organo de P. T. T. „P. T. Dzive“, organo de la Societo de Latvaj poŝtistoj dediĉas al esperanto 2 paĝojn.

SVEDUJO. Sveda parlamenta domo kiel Kongresejo. La unuan fojon okazos, ke la plej gravaj aranĝoj de 26-a Kongreso en Stockholm okazos en sveda parlamenta domo.

Sukcesoj de Korespondaj Kursoj: Dum jaroj 1925—1932 25.000 personoj partoprenis svedan Korespondan esperanto-kurson.

Turistaj aranĝoj de Esp. Turista Komisiono. Esperantista Turista Komisiono aranĝas turistajn vojaĝojn eksterlanden, kiujn partoprenas ankaŭ neesperantistoj.

Lakshmiswar Sinha denove en Svedujo. Kiel raportas Svenska Esperanto — Tidningen fama Samideano Lakshmiswar Sinha denove venis por kelkaj monatoj al Svedujo.

SOVETUNIO. Oficiala subvencio de Esperanto. En Moskvo la Komitato de Sindikatoj donis 8.000 rublojn kiel jaran subvencion al Esperanto, disporigante senpage ĉion por amaskunsidoj de esperantistoj kaj por ekspozicioj de esperantaĵoj.

Nova socialista mondorganizaĵo estas I. S. E. (Internacio de Socialistaj Esperantistoj). Post fina unuecigo de neŭtrala movado en Kolonjo ni havas novan skizmon ĉe socialista movado. La fondintoj de I. S. E. pravigas ĝian kreon riproĉante al S. A. T., ke ĝi havas individualisman organizformon, dum I. S. E. ĉiam akcentas sian kolektivisman karakteron.

EUGEN ELI.

ESPERANTA SEMAJNO.

Kiam antaŭ kelkaj monatoj ekestis ĉe ni, krakovaj esperantistoj, ideo pri „Esperanta Semajno“, multaj opiniis tion tute ne farebla.

Nun oni jam scias, ke „Esperanta Semajno“ en Kraków trovas siajn imitantojn. Varsovio aranĝas „Semajnon“ en novembro; Tarnów en decembro. En aliaj polaj urboj ankaŭ la E. S. okazos.

Memkompreneble ke la efiko estus multe pli granda, se la Esperanta Semajno okazus en tuta Polujo samtempe. Bedaŭrinde, kiel almenaŭ estas al mi sciante, nur Kraków respektis la daton proponitan de P. E. D. Tamen — ni esperas tion — la „II Semajno“ okazos jam ĉie en la sama tempo.

Nun, sur tiu-ĉi loko, mi volas prezenti kelkajn rimarkojn, kiujn nin instruis nia „Semajno“, kaj kiuj povas esti utilaj por aliaj.

Estas tre bone, se la „Semajno“ havas sian „Protektanton“. Al tiu honoro oni devas peti nepre iun gravulon (en Kraków ni invitis Prezidanton, D-ron Kaplicki). Al honora komitato estas bone peti inter aliaj ĉiujn redaktorojn de lokaj gazetoj. La afero de propagandaj artikoloj, komunikoj k. t. p. estas tiamaniere solvita.

Sed plej grave estas, ke ĉiuj aranĝoj de la „Semajno“ estu kiel eble senpagaj aŭ almenaŭ tre malmultekostaj! Ne gravas, se post la fino de la „Semajno“ montriĝos, ke oni atingis neniun profiton. Se nur la „Semajno“ plenumos sian propagandan devon, oni povas toleri eĉ malgrandan deficiton. Hazarde ĝi povas ja ĉiam okazi. Tial ankaŭ la kasaj rezervoj devas esti sufiĉe altaj. Se tamen la kasoj estas malplenaj, pli bone estas aranĝi „Semajnon“ pli modeste, ol allasi deficiton nekovreblan per kasaj rezervoj. Koncerne al la elspezoj oni devas esti ŝparema sed ankaŭ — kuraĝa. Post la krakova „Semajno“ mi aŭdis de kelkaj pli maljunaj samideanoj: „Vi ĉiuj estas tamen grandaj riskuloj“. Mi tute dubis pri tiu „Semajno“.

Ni ne estis riskuloj. Ĉio estis detale pripensita kaj preparolita. Sed ni ankaŭ ne volis resti ĉiam dormantaj. Se oni volas venki oni devas ĉiam rememorigadi al la publiko, ke Esperanto vivas. Tial ankaŭ la Esperanta „Semajno“ devas okazi ĉiujare.


Ankoraŭ unu rimarko. Kiam vi alsendos raportojn pri „Esperanta Semajno“, estu ili fidindaj, sen troigo kaj fantaziado. Nur veraj raportoj, eĉ se ili estus anoncantaj malsukceson, povas esti utilaj.

Dum la venonta Tutpola kongreso ni detale preparolos la aferon de „Esperanta Semajno“. Kaj post tio ni povos ankaŭ prezerti taŭgajn proponojn al la Universala Kongreso. „Esperanta Semajno“ devas ja okazadi ne nur en Polujo, sed en la tuta mondo!

DISTRAJĴOJ

II. ENIGMOKONKURSO.

La solvojn de enigmoj el la lasta numero, kiel ankaŭ ĉi-subajn oni povas sendi ĝis la 30 novembro.



Signifo de la vortoj: 1. Latina litero, 2. Havi plezuron, 3. Nomo de eksterlanda nomo 4. Portas la viro. 5. Alie malhelpaĵo, 6. Senedzinulo, 7 Pronomo, 8. Litero.

La mezaj literoj, legataj de supre suben donas titolon de verko en esperanto, kiu aperos. en plej proksimaj tagoj.

Pro solvo de tiu-ĉi enigmo ni alkalkulas 3 punktojn.

ENIGMO NRO 4.

Alie virino + planedo + alie scio + prepozicio + litero fonetike = grava. okazintajo en Esperantujo.

Pro solvo de tiu-ĉi enigmo ni alkalkulas 1 punkton.

RIDU IOMI

Mastrino al la servantino: Mi vidis, ke la laktisto kisas vin. Mi ne povas permesi tion. De nun mi prenos la lakton.

Servantino: Estos senutile, sinjorino. Li promesis ke li kisos neniun, krom mi.

I. ESPERANTA SEMAJNO EN KRAKÓW

Oficiala raporto.

I. Esperanta Semajno en Kraków okazis la 16—22 de oktobro 1933. La laboro, dividita en 3 partoj, estis jene aranĝita:

I. Parto: **PROPAGANDA**. Nome propagando per: a) broŝuro, 16-paĝa, oni ĝin disdonadis senpage dum la prezentadoj, en lernejoj, en la universitato, k. t. p. b) afiŝoj: oni disgluis grandajn afiŝojn en la urbo kaj afiŝetojn en ĉiuj tramoj. c) prelegoj: en 6 gimnazioj. d) oni projekciadis en 4 kinejoj kliŝon prezentitan en lasta numero de P. E. e) per gazetoj: en ĉiuj krakovaj gazetoj aperis po 2 artikoloj pri „Semajno“, kaj dum la „Semajno“ aperadis ĉiutage komunikoj.

II. Parto: **ARANĜA**: a) Akademio kaj enmanigo de la standardo de „Societo Esperanto“. Ĉeestis pli ol 300 personoj. Post la akademio oni malfermis ekspozicion de esperanto gazetoj kaj libroj. b) Humora revuo „Plej gravas humoro“. Ĉeestis ĉirkaŭ 180 personoj. c) Hungara vespero. Ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj. d) Prova leciono laŭ Ce-metodo. Ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj. e) Verda Nokto (dancvespero). Ĉeestis 190 personoj. f) Lotumado en Soldata Domo.

III. Parto: **PORLINGVA** a) Lektorado en la universitato, b) kursoj en gimnazioj, c) publika kurso.

Ĉiuj aranĝoj kun pagataj enirbiletoj kovris sin finance laŭ la plano. La aranĝojn senpagajn por la publiko (ekz. Akademion) devis kovri gajno de la dancvespero; bedaŭrinde ĝi pro samtempaj 2 konkuraj dancvesperoj donis nenian gajnon. Tial ankaŭ restis malgranda deficiito, kovrita per kasaj rezervoj.

La elspezoj de la „Semajno“ atingis 1451 zł. 54 gr, la enspezoj donis 1302 zł. 18 gr. Nuntempa deficiito 149 zł. 36 gr. Post enpago de 80 zł. kiujn oni ŝuldas ankoraŭ al la kaso de la „Semajno“, restos fina deficiito ĉirkaŭ 70 zł.

EKZEKUTIVA KOMITATO
DE LA I. ESPERANTA SEMAJNO
EN KRAKÓW.

SPORTO KAJ TURISMO.

La VI-a Tutpollanda Esperantista Kongreso en Varsovio ekceptis la inviton de Gdynia, ke la VII Kongreso okazu apud la Pola Maro.

Estos do tre interese kaj utile por niaj legantoj konatiĝi kun la multampla kaj detala priskribo de la pola Marbordo kaj haveno de Gdynia — la venontjara Esperanto-Urbo, alsendita de nia kunlaboranto Sinjoro Red. Oskar Berman.

VIZITU GDYNIA ĜIAN HAVENON KAJ ĈARMAN KASUB-SVISUJON MARO ESTAS VOJO AL LA BELA MONDO.

(MIAJ IMPRESOJ DE LA SOMERA LIBERTEMPO APUD LA MARO).

Gdynia estas la plej juna kaj samtempe unu el la plej interesaj havenurboj de la postmilita Eŭropo. Ĝia disvolviĝo, konstruo kaj vivo pligrandiĝas de monato al monato, de tago al tago.

Akiro de marbordo malkovris entaŭ ni vastajn horizontojn de grandaj eblecoj de transmara ekspansio. Maro-tio estas malfermita vojo en la vasta belega, abunda mondo; tio estas alproksimiĝo al la sunplenaj landoj, kie la naturo disemis per malavara mano riĉaĵojn sur la surfaco kaj en profundo de la tero.

Kun la Pola Maro kunigas la mondon multaj ligoj. Kaj nune apenaŭ en la lastaj monatoj la pola socio komencis konjekti la grandan rolon kaj signifon de la maro por la ekonomia, turista, somerripozeja vivoj, kaj ĉefe por la potenca pozicio de Polujo. Oni devas konsideri, ke en la jaro 1923 oni komencis konstrui la havenon en Gdynia, tiama fiŝkaptista vilaĝo. De tiu momento estas daŭrigataj kun tuta energio la konstru-laboroj, kaj la ekonomia valoro de la haveno respeguliĝas en ĝia komerco. Disvolviĝon de la urbo karakterizas la plimultiĝo de ĝia loĝantaro: Gdynia-vilaĝa komunumo havis en la jaro 1913 — 301 loĝantojn, en jaro 1921 — 3164, nun jam urbo-la cifero de ĝia loĝantaro atingis 40.000, kaj kreskas daŭre.

Gdyna disvolviĝas kun eksterordinara rapideco, precipe en la lastaj jaroj, kiam la labora intenseco estas pli kaj pli forta. La fiŝkaptistaj dometoj estas

forpuŝitaj de gigantaj konstruaĵoj de la ĉiam kreskanta urbo. Kie iam estis torfminejoj kaj herbejoj, nun estas placoj kaj ĝardenoj. Gdynia nune posedas 48 ŝtatajn konstruaĵojn, 21 urbajn, kaj 2155 privatajn — krome — modernan statan Marlernejon, Instituton de Mar-Negoco kaj grandan Poŝt-Telegrafan Oficejon je precipe alta teknika nivelo. Ĝis nune estas finkonstruitaj stratoj je longeco de 14 km. kaj duobla kanaliza sistemo servas por la sanitaraj kaj pluvkanaloj, pumpil-kaj de-fluej — stacioj aranĝitaj laŭ plej novaj teknikaj akiraĵoj. Kompreneble, ke samtempe kun la kreskado kaj disvolviĝo de la urbo kaj haveno Gdynia, kaj la plifortiĝo de turisma trafiko la vivo ekonomia, socia kaj societa disvolviĝas pli kaj pli. Daŭre pliiĝas vendejoj, elegantaj restoracioj, ĉiaspecaj amuzejoj, hoteloj, k. t. p. Bedaŭrinde estas tamen ke en Gdynia kaj ĉirkaŭaĵo la loĝado kaj vivteno, private kaj en hoteloj estas tro kara. Oni sentas mankon de hoteloj kaj ripozejoj por turistoj.

La havenurbo Gdynia rapide disvolviĝas; ĝia nuna grandeco estas 950 ha. La longeco de la fervoj-reto de la haveno atingas 120 km. kaj konstante kreskas. La longeco de la publikaj vojoj estas ĉ. 12.5 klm. La haveno posedas transport-instalaĵojn kaj modernan aparaton por lumsignaloj, sirenoj, nebul-sonoriloj kaj submarsignaloj. En la haveno mem ekzistas vico da privataj entreprenoj kaj industriaj institucioj. Kiel ekzemple: riz-senseligejo, ole-uzino, ŝipkonstruejo (posedanta gigantan ŝipriparejon je portkapablo de 300) kaj malvarmigejo estanta la dua laŭ grandeco (post la Hamburga) havenmalvarmigejo en Eŭropo.

Gdynia kaj precipe ĝia haveno ludas gravan rolon rilate internacian komercon kaj turismon. Gdynia estas en senpera komerca kontakto kun multaj landoj kaj ĉiujare pligrandiĝas la cifero kaj kvalito de la flagoj. Ĝi posedas nun pli ol 30 ŝipliniojn priservantajn pli ol 100 havenojn sur la tuta terglobo.

La plimulto da Gdynia havas regulan komunikacion kun ĉiuj plej gravaj havenoj de Eŭropo, proksima Oriento, Norda Afriko, Norda kaj Suda Ameriko kaj la Meksika Golfo. En la lasta tempo la eksporto kaj la importado de ĉiuj varoj kaj krudaĵoj de Polujo kaj al Polujo iras tra Gdynia. En la urbo mem ne mankas la fervoja kaj aŭtomobila komunikoj: la vojoj estas bonegaj.

La plimulto de loĝantaro sur la Pola Marbordo precipe la Kaŝuboj okupiĝas per fiŝkaptado kaj transveturigo sur velŝipoj de unu bordo al la dua. Gdynia kaj ĉiuj urboj kaj vilaĝoj sur la Pola Marbordo fariĝis en la lastaj jaroj tereno por turismo, kolonioj kaj somera ripozo por la tuta Polujo.

Eĉ de eksterlando venas amase ekskursoj por vidi kaj admiri Gdynia-havenon kaj koloniojn sur la Pola Marbordo, ĉar ne mankas tie belaj kaj ĉarmaj lokoj por ekskursi kaj ripozi. Precipe oni veturas el Gdynia per aŭtobusoj, vaporŝipoj aŭ fervojo al Orłowa, Hel, Jastarnia, Kuźnica, Monto Jastrzębia, Karwia, Ostrowie, Kartuzy, Wejherowo, Kaŝuba Svisujo k. t. p. Krome oni ekskursas por viziti Gdańsk, Zoppot, Oliwa, Langfuhr ktp.

La someraj libertempejoj sur la Pola Marbordo fariĝas pli kaj pli modernaj, kaj ĉiujare kreskas la cifero de la tien veturantaj homoj. En tiu-ĉi jaro en la hoteloj, pensionoj, turistaj domoj, sur la albordiĝejo, en la fiŝkaptistaj domoj, ĉie estis plen-plene. Po kelkaj personoj devis loĝi en unu ĉambro, laŭvorte sur subtegmentoj, planko, pajlo.

Valoras aldoni ke Lodza Landkonema Societo posedas jam la trian jaron kolonion en Karwia kaj havas grandan sukceson. Tiu-jare loĝis tie ĉ. 130 personoj. Dum mia ĉeestado en la kolonio oni faris ĉiutage ekskursojn al diversaj lokoj; krome estis aranĝata tiutempe Esperanto-turista Vespero, kiu ĝuis grandan sukceson en Karwia kaj Gdynia mi renkontis multe da esperantistoj, kiuj multe helpis al mi per informoj kaj konsiloj.

Se estus en tiuj lokoj pli da hoteloj, kolonioj kaj ludĉambroj, estus kompreneble pli granda alfluo de homoj de la tuta Polujo, kaj dume multaj pasigas la noktojn en malvastaj ĉambroj, kvazaŭ submetiĝante punon por loĝi somere apud la maro kaj spiri ĉiutage la freŝan aeron, kaj kontakti kun la naturo, tiel ĉarma kaj bela.

Tie estas la ĉielarkajo, kaj tie apud la maro la verdajo ne estas nur avara fragmento de vilaĝa, eldevigita dekoracio, sed esenca parto de la vidita ĉirkaŭaĵo, kie la sunradioj, vere varmigas, kie oni povas ĝui belajn, interesajn ekskursojn per velŝipoj, fiŝkapti kaj rivi sin per beleco de la naturo.

Multaj homoj scias la valoron de la Maro kaj ĝia boninfluo. Sed multaj ne scias pri la bonfara efiko de la turisma vivo. Oni devas scii, ke el inter

la multaj eblecoj de ekskursado-ekskurso ev. estado apud la Maro prezentas la plej-multon da ĉarmo, kaj donas plej-multon da profito por la korpo kaj animo.

Nia socio turnas sin nune pli forte al la Maro, kaj ekskursoj tien havas grandan sukceson; kaj ne miriga estas tiu fakto-la estado apud la maro-vere donas multajn kvantojn da riĉaj neforgeseblaj impresoj je granda skalo, kaj entute forŝiras la homon de liaj ĉiutagaj zorgoj. Ĝi alportas ripozon por la animo per ŝanĝo de la kondiĉoj, provizante la homon per sano kaj forto.

Se mi estus povinta ordoni al la homoj loĝantaj en la sufokaj urboj, malvastaj loĝejoj, laborantaj en neaerumitaj oficejoj, mi ordonus, ke por printempo kaj somero:

„Ĉiuj dum la libertempo al la maro“ al akvo, ĉar tiu, / kiu ĝuis unufoje la estadon apud la Marbordo, tiu ĉiam al ĝi revenos“.

Oskar Berman.

ESPERANTO KAJ FUTURISMO.

Antaŭ kelkaj monatoj vizitis Pollandon fame konata italo, Ekscelenco Francesco Marinetti, kreinto de futurismo, kiu en kelkaj polaj urboj havis interesajn prelegojn.

Vizito de la fama futuristo havis ĉe ni, en Lwów, ankaŭ sian influon je esperanto. Mi konvinkiĝis pri tio, kiam mi preparadis paroladojn de s-ano Kola Ajayi en Lwów. Mi volis lui, por publika parolado, la saman salonon, en kiu prelegis Marinetti kaj kiu apartenis al konata, lvova, kultura Klubo.

Iutage mi iris sekretariejon por demandi kondiĉojn. Akceptis min, tre eleganta, juna Sekretario, vera tipo de moderna dando. Post eble duonhora interparolo, dum kiu mi havis okazon multe rakonti al simpatia Sekretario ankaŭ pri esperanto, jam elirante, mi ankoraŭ ekdemandis:

— nu, sinjoro Sekretario, kaj kia estas via opinio pri esperanto, kaj pri nia „negra aranĝo“?

— Mia opinio? — Sekretario, kiu ĝis nun, kun saĝa mieno, aŭskultadis min, — ekmoviĝis maltrankvile, kaj - post momento respondis — vi scias Sinjoro..., mi ne povas tion diri al vi, ĉar... mi entute ne estas... futuristo kaj mi malbone konas futurismon...

Senvorte mi manpremis „malplenkapan“ (bela esprimo, ĉu ne?) Sekretarion kaj mi foriris. Z.

BIBLIOGRAFIO.

Santander: Teritorio, historio, kutimoj k. t. p. Aranĝita, tradukita kaj verkita de Julio Mangada Rosenörn.

Tiu ĉi gvidlibro tra Santander 128-paĝa, sur duonkreta papero, eldonita de Hispana Esperanto-Asocio dank' al monhelpo de la Nacia Patronaro por Tula vojaĝoj de Gulivero. 1-a parto. Vojaĝo al Liliputlando. Prezo 1.25 ned guld.

W. J. A. Manders: Odysseias de Homeros. Unu el plej antikvaj libroj en la plej moderna lingvo.

Janis Rainis: Amo estas pli forta ol morto. Tragedio en 5 aktoj. El latva lingvo tradukis Ints Čaĉe. Eldonis Latva Esperanto-Societo

Julio Baghy: Verdaj Donkiĥotoj. Prezo broŝ. 2 sv. fr.

Ladislav Vladyka: Mi en li. El la ĉeĥa tradukis Moraviaj Esperanto Pioniroj.

Kantas la hŭgara skolto: Hunagraj kaj skoltaj kantoj.

GAZETOJ PRI ESPERANTO.

„Czas“, „Express Ilustrowany“, „Naprzód“, „Nowy Dziennik“: mencioj kaj komunikoj pri „Esperanta semajno“ en Kraków.

„Ilustrowany Kurjer Codzienny“ komunikoj pri Esperanta Semajno; 22. X. Satira felietono de Z. Nowakowski s. t. „Multaj estis cimbalistoj...“; 28. X. „25.000 kilometrojn kun esperanta stelo“.

En ĉirubriko ni mencias senditajn al ni polajn gazetojn, kiuj enhavas artikolojn pri Esperanto.

POLLANDA KRONIKO.

KRAKÓW. Okaze de nia „I. Esperanta Semajno“ ni ricevis multajn gratul-telegramojn kaj leterojn. Ni kore pro ili dankas al sendintoj.

Laste vizitis nian urbon estona samideano Genady Kritschann, kiu en la ejo „Societo Esperanto“ faris prelegon pri sia mondvojaĝo.

La 30. X. okazis raporta kunveno pri E. Semajno, La 6. XI. S-ano Eugen Eli prezentis novaĵojn el Esperantujo.

LWÓW. „Societo Esperanto“ fervore eklaboris dum aŭtunaj tagoj. 14. VIII F-ino Minuška Mantel aŭdigis humorajon „La edziĝtago“. 21. VIII. Min. Mantel el Heroldo-Kongresnumero. 28. VIII. Min. Mantel: Humoraĵo: „Kiom da korvoj estis“. 4. IX. S-anino Fanny Steigerówna pri spertoj dum ŝia libertempo en Jaworów. 11. IX. S-o Dr. Karol Klein „vojaĝo tra Belgujo“ — samvespere en Polskie Radjo prelegita programo. F-ino Lena Fruchtówna recenzis la filmon „Hallo, Berlin, Hallo, Parizo“.

La prelegantoj ricevis pro belegaj laŭtleĝoj tondran aplaŭdon de fervora, multnombra aŭskultantaro.

18. IX. Minuška Mantel filmrecenzo: „Frankenstein“.

Kursoj vigle funkcias. Ilin gvidas Nadlówna, Kleinowa, Fruchtówna.

Konversacian rondeton gvidas Minuška Mantel. Preparoj de Esperanto-Semajno komenciĝas.

B E N Z I N O el gaso.

(Fina parto de la artikolo, el antaŭa n-ro. s. t. Interesaj sciindaĵoj).

En la eksperimentinstituto de „Polmin“ en Drohobycz en Malgrandpolujo la inĝeniero Tomasik faris provon pri transformado de gasoj eligantaj el la petrolŝaktoj en benzinon.

Laŭscie la gazoj estas ĝis nun uzataj nur por hejtado kaj ne por movigado. La eksperimento de inĝeniero Tomasik povas eligi turnon en la mondscienco.

La eksperimentoj de pola sciencisto superas la laboron de berlina kemiisto prof. Fischer, kiu sukcesis produkti benzinon el karbo.

DE LA REDAKCIO.

La venonta numero aperos la 1-an de decembro. La redakcian materialon oni petas sendi ĝis 20-a de novembro.

Por la rubriko: „Pollanda Kroniko“ ni petas alsendadi komunikojn kiel eble plej mallongajn

ANONCOJ.

Esperantisto parolanta france, ruse, elokventa, bone prezentanta, ekonomie instruita serĉas okupon kiel kapabla vendisto, akiristo, vojaĝisto, librotenisto, korespondanto, privatinstruisto. **Bolesław Michalik, Kobyłka pod Warszawą, ul. Królewska 35.**

PRZEDSTAWICIELE — REPRESENTANTOJ:

Białystok — Esperanta Societo Zamenhofa, Polna 4.

Katowice — Societo de Esperanto Amikoj, Wawelska 3.

Paryż — S. Grenkamp, 147. Bd. Jourdan.

Warszawa — Halina Weinstein, Leszno 99. m. 5.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. (przy przesylce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) prenumerata roczna zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 84.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70. duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660

Drukarnia L. Gronusia i Ski, Kraków, ul. Stolarska 6.

Redaktor odpowiedzialny Juljusz Kriss.

K U P O N O N-RO
POR
II ENIGMOKONKURS

